ADORU 579



2. Se dum l' irado velkas energi',
helpo staras preta kontraŭ apati';
graco plen-sufiĉa estos nia fort',
lumo sur la vojo estos Via vort'.
Glora …

3. Donas ripozon valoj de kviet',
kie al si kantas gaja riveret'.
Ĉe trankvilaj akvoj kuŝas ni sen tim',
dolĉe revigliĝas korpo kaj anim'.
Glora …

4. Tra l' ŝanĝiĝantaj scenoj de la viv'
brilas antaŭ ni mirinda perspektiv'.
Vi ĝin priparolis en l' evangeli',
certe ne nin trompas vana fantazi'.
Glora …

5. Vi en Jesuo kun la Di-Spirit'
tiras nin algrimpi al la viv-zenit'.
Sub flugiloj Viaj ni ne vagos for,
bonvenigon aŭdos en ĉiela glor'.
Glora …

VIN, GLORA DIO, LAŬDAS NI KUN ĜOJ' • M (Maccabaeus): Georg Friedrich Händel 1747, Unisono 35, EBL 271, EG 13, RG 370, EM 152, LH 83, HON 503 • E (originale verkita): W. J. Downes 1975 • TK 39 • Psa 23,2-3